# *Fini?as en Venezuelo la kolekto de subskriboj subtene al la kandidatoj por la nacia konstitucia asembleo.*



Karakaso, 12 jun (RHK) ?i-lunde la procezo de subskribo-transdono por subteni la kanditatarojn al la nacia asembleo konstitucia (ANC) en Venezuelo fini?os, kiel parto de la starigita datprogramo flanke de la nacia elekta konsilantaro (CNE) fronte al la elektoj de la venonta julio.

La 545 delegitoj  al tiu instanco de konstitucia reformo kunvokita de la venezuela prezidento Nicolás Maduro pasintan majon, estos elektitaj la venontan 30-an de julio, asertas la televida ?eno Telesur.

La kandidatoj devos prezenti subtenon de 3% de la subskriboj de sia koncerna distrikto, dum la kandidatigitoj flanke de elektaj grupoj ne bezonos subskribojn.

Kaze de la kandidatoj de la sektora sfero, kamparanoj, fi?kaptistoj, entreprenistoj, pensiuloj kaj personoj handikapaj devos prezenti  500 subskribojn, dum gestudentoj kaj laboristoj legitimigos sin per mil

subskriboj.

Por la kandidatigitoj de la komunaj kaj komunumaj konsilantaroj, nur estos necese prezenti la atestilon de la elekta komisiono de amba? instancoj.

Tiun ?i pasintan diman?on, Maduro elstarigis la popolan partoprenon  de la civitanaro, elpruvita per la kandidatigo de pli ol 52 000 prekandidatoj de la ANC.

Li aldonis ke tiuj kiuj opozicias al la konstitucia asembleo, faras tion kun la celo sekvestri la suverenecon kaj povon de la popolo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/132314-finigas-en-venezuelo-la-kolekto-de-subskriboj-subtene-al-la-kandidatoj-por-la-nacia-konstitucia-asembleo

**Radio Habana Cuba**